

ESPERANTO PROVENCE

Numéro 84 - Printemps 2011

4 numéros par an

redaktoro: Renée Triolle
triolle.renee@wanadoo.fr

Bello Bauco / 694 chemin de la Civade Verte

kasisto: Michel Cerisay
15 Place des Vents Provençaux
13140 MIRAMAS

VORTO DE LA PREZIDANTO

Brile sukcesis la Mediteranea Esperanto-Semajno, dank' al la persistema laboro de niaj gemikoj en Saint-Raphaël. En Manosque ankaŭ, homoj regule informas, same en La Ciotat, Esperanto provas kontribui al alies programoj sed persiste montri, ke ĝi ekzistas, kaj estas vivanta lingvo.

Se internaciaj radioj, kiuj elsendis tradicie en Esperanto, kiel Radio Polonia rezignas, Eŭropa Unio komencas kompreni, ke informi en ĉiuj oficialaj

lingvoj estas granda problemo kaj kosto, do ke prefere ĝi uzu neŭtralan lingvon, kia estas esperanto.

Multaj el vi partoprenos la komunan esperanto-aranĝon en Sète, IREM. Venu ankaŭ multnombroj al nia regiona kongreso en Saint-Raphaël la 21an kaj 22an de majo. Ni atendas vin.

Pierre Oliva

RENDEVUOJ

KONGRESO kaj MEMBRO-KUNVENO en SAINT-RAPHAEL la 21an kaj 22an de majo

(Vidu la detalan programon kaj aliĝilon
sur kunmetita folio.)

Ili okazos en agrabla feriejo, meze de pinarbaro, tute proksime de la centro de Saint-Raphaël. Eblus tranokti kaj kune manĝi je ne tro kostaj prezoj. Nepre aliĝu por faciligi nian laboron. La tuta restado (de sabata tagmanĝo ĝis dimanĉa tagmanĝo) kostas 42 eŭrojn, nur manĝo 10 eŭrojn.

Sabate, ni proponas al vi diskutrondon pri malfeliĉa Japanio kaj atomenergio kun Renée Triolle kaj Patrick Lagrange, prelegon de Monique Arnaud pri Lidja Zamenhof, konversacian rondon kun gesinjoroj Villain kaj distran vesperon pri indiĝena popolo la «flor-homoj» far Jean-François Cousineau. Tio kostas 10 eŭrojn (15 por paro). Dimanĉe matene je la 9a okazos la membrokunveno; evidente, partopreno en ĝi estas senpaga.

Informas: Christine Grayssagel, Les Iles d'Or,
chemin du Progrès, 83600 FREJUS aŭ
prezmoni@hotmail.com

Se vi ne venos, ne forgesu sendi vian rajtigilon al la sekretario, Monique Arnaud, chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, 05500 BENEVENT aŭ
monique.arnaud@aliceadsl.fr,
aŭ transdonu al partoprenonto.

KANDIDATIĜU al la KOMITATO:

En asocio laŭ leĝo de 1905, la Komitato estas la «Parlamento» de asocio, kie ĉiuj estas bonvenaj. Se vi deziras pli konkrete kontribui al la laboro de Esperanto-Provence, proponi ideojn, kunlabori laŭ via fako, reprezenti vian urban klubon, nepre kandidatiĝu. Sendu vian kandidatiĝon al la sekretario, Monique Arnaud (adreso supre).

PRELEGOJAĜO DE MARITZA GUTIERREZ GONZALEZ

Ĵurnalistino de Radio-Havano, Maritza estas ankaŭ estrarano de UEA. Ŝi estas invitita de Esperanto-France prelegvojaĝi tra Francio; ŝi partoprenos en IREM en Sète kaj tuj poste vizitos nin. (Vidu la.6an paĝon)

KUBO, INTER REVOJ KAJ REALECO...

* en Marseille, marde la 26an de aprilo je la 18a, ĉe CIRA, 3 rue Saint-Dominique (apud boulevard d'Athènes, metroo Canebière aŭ Saint-Charles)

* en La Ciotat, merkrede la 27an de aprilo je la 17:45 en Grand Portique, 18 rue Vignol (malnova urbo, malantaŭ la preĝejo).

Kiel kutime, ni organizos viziton de la urboj, komunan piknikon kaj amikajn interŝanĝojn.

Pliaj informoj: Renée Triolle 04 42 71 42 74 aŭ
triolle.renee@wanadoo.fr

.../...

REGIONAJ EKZAMENOJ de FEI

Les examens d'espéranto ont lieu le dimanche 5 juin 2011 à Marseille, (8ème) collège Pasteur, rue Paul Claudel (métro Dromel, ligne 2)

Il est possible de passer les examens de FEI, niveaux 1, 2 et l'écrit du 3.

Il est possible de passer le même jour les examens 1 et 2.

Pour faciliter l'organisation, s'inscrire auprès de Renée Triolle, 04 42 71 42 74 ou triolle.renee@wanadoo.fr

08:30/09:00 - accueil, café

Ecrits:

- N1 → 09:00/10:00
N2 → 09:00/09:40 - gramatika testo
N2 → 10:00/12:00 - teksto, demandoj kaj verkaĵo
N3 → 09:00/12:00 - al-kaj-detraduko

12:00 -repas

(il est prudent de porter un pique-nique, les restos du quartier sont fermés le dimanche)

- N3 → 14:00/17:00 - dissertation.

Oral:

- N 1&2 → 14:00...

ASSEMBLEE GENERALE de REINSERTION et ESPERANTO

L'Assemblée Générale aura lieu le 7 mai .

Renseignements

auprès de

Claudie Demongeot

04 90 22 17 02

ou

testudeto@gmail.com

AGADRAPORTO (resumo)

La tutan raporton vi aŭdos dum la Membro-Kunveno. Se vi ne partoprenas kaj deziras detalojn, petu ĝin de Monique Arnaud.

- 1 - Administrado: fine de dec.2010, estis 67 membroj; funkcias 14 grupoj.

La membro-kunveno okazis en Manosque la 9an de majo, kaj elektis 10 komitatanojn. La Komitato kunvenis en septembro kaj en februaro.

- 2 - Informado:

- 2.1 - Interna bulteno «Esperanto-Provence» aperas 4foje jare, redaktita de Renée Triolle, enpaĝigita de Bernadette Deschanel kaj ekspedita de la grupo de Saint-Raphaël.

TTT-ejo prizorgita de Franz de Mimmersheim pliboniĝis, bedaŭrinde ĝi ne estas sufiĉe vizitita. Ankaŭ rektaj informoj estas senditaj tra la retlisto Provenco, nun prizorgate de Olivier Faurax.

- 2.2 - Ekstera: La Federacio daŭre cirkuligas la ekspoziciojn (ne sufiĉe ofte petataj); ĝi aĉetis kaj disdonis al la grupoj la flugfolion «Langue équitable» kaj larĝskale distribuis la kalendarojn de JEFO. En kelkaj urboj estis farita la enketo «Ĉu vi scias, kio estas esperanto?», bela okazo informi iun ajn.

Informado estas farita de unuopaj grupoj okaze de Forumoj de Asocioj (Aix, Marseille, La Ciotat, Manosque, ktp), kaj alitipaj aranĝoj (Tago de Paco, de Patrino Lingvo, de Poezio,

de Solidareco, ktp). Same gazetartikoloj aperas en la urboj, kie io okazas.

- 3 - Kulturo: nenio aparte, krom preparo de dosieroj por Marseille 2013. Ekspozicio de pentraĵoj en La Ciotat kadre de Internacia Jaro de Alproksimiĝo de Kulturoj.

- 4 - Instruado: la Federacio organizis Intensivan staĝon la 2an kaj 3an de oktobro, staĝon en Manosque la 8an de majo, kulturen staĝon kun 3nivelaĵoj kursoj la 27an kaj 28an de novembro. Ĉefas la Mediteranea Esperanto-Semajno en Agay en februaro, jam tradicia kaj perfekte organizita de la grupo de Saint-Raphaël.

Krome, diversaj paroligaj kursoj okazas en diversaj urboj.

- 5 - Praktikado: diversaj amikaj renkontiĝoj, vizitoj de ekspozicioj ks kreas bonan etoson por amikiĝi kaj paroli.

Ankaŭ vizitoj de eksterlandanoj, ĉu privataj, ĉu invitataj de grupoj (ekz. Mireille Grosjean en La Ciotat, Miyoŝi/Atilio en Marseille) kontribuas.

- 6 - Rilatoj kun aliaj asocioj.

Rilatoj kun asocioj (ĉefe kulturaj aŭ alternativa) okazas je la nivelo de urboj aŭ individuoj, laŭ la eblecoj. Bedaŭrinde la Federacio ne havas politikon ĉidirektan.

INTERVJUO KUN ALAIN REMY

A sa retraite Alain Rémy décide de parcourir le monde à vélo. Après 18 mois à pédaler en Chine et au Vietnam, franchir des cols à plus de 5 000 mètres, en tirant une remorque de 160 kg, il marque une pause à La Ciotat, où il perfectionne sa connaissance de l'espéranto, très utile pour avoir des contacts le long du parcours. Un peu avant son départ, le 3 avril, nous lui avons posé quelques questions.

E-P: *Alain Rémy, vi estas akurata lernanto de Esperanto en La Ciotat. Diru al ni, kiu vi estas?*

AR: Mi estas emerita instruisto. Mi estis lernejestro de la lernejo La Garde en La Ciotat. Mi emeritiĝis en 2004. Post tri edziĝoj mi vivas sole kaj mi vojaĝas bicikle.

E-P: *Mi aŭdis, ke vi estis sportisto. Kiujn sportojn vi praktikis (aŭ praktikas nun)?*

AR: Mi praktikis gimnastikon (1966-1967), halteron (1967-1979), ĵudon (1978-1983), kurumon (1986-2000). De tiam mi biciklas.

E-P: *Kiam vi malkovris longdistancon bicikladon? Kiel?*

AR: En 2000, mi malkovris longdistancon bicikladon: La Ciotat-Virton (Belgio) kun revenvojaĝo (2082 km dum unu monato). Vojaĝi per biciklo estis malnova revo. Sed mia edzino estis tre hejmema kaj malsportema. Do, mi ne povis realigi mian revon. Nu, en 1999 ni disiris kaj alia vivo komenciĝis por mi.

E-P: *Kien vi biciklis?*

AR: Kiam mi laboris, mi vojaĝis dum someraj ferioj: 2000 Belgio, 2001: Anglio, Skotlando, Kimrio; 2002: Danio; 2003: Ukrainio. Mi emeritiĝis en septembro 2004 kaj vizitis miajn amikojn en Eŭropo: Germanio, Francio, Hispanio, Portugalio, Italio. La 5an de marto 2005, mi ekiris el La Ciotat bicikle al Ĉinio kaj Vjetnamio. Mi revenis en La Ciotat la 14an de oktobro 2006. La jaro 2008 portis min al Baltaj landoj: Litovio, Latvio, Estonio.

E-P: *Ĉu vi povas rakonti unu aŭ du anekdotojn dum tiuj vojaĝoj?*

AR: Mi biciklis nokte en Rusio. Mi decidis tendumi en herbejo. Bonŝance, neniu kaj nenio je la horizonto! Mi tendumis kaj bone dormis. Matene, kiam mi vekigis, mi vidas ĉirkaŭ la tendo bovinojn kaj multajn bovfekaĵojn! Aliafoje mi biciklas en Ĉinio: unu granda nigra aŭto malakceliĝas apud mi. Unu el la fenestraj vitroj malleviĝas. Iu ulo alparolas min angle: «Mi estas deputito kaj invitas vin por vespermanĝo. En kiun hotelon vi

iras? - Mi ne scias, mi unuafoje veturas al Luŝan! - Sekvu min». Ni alvenis unu grandan (supozeble multekostan) hotelon. Ĝi estas plena. Mia nova ĉina amiko diras: «Donu telefonon al mi.» - «Lo, Ha lo! mi estas sinjoro Song, deputito....» Post kvin minutoj, li anoncas al mi: «Vi havas ĉambron».

E-P: *Vi baldaŭ komencos biciklvojaĝon al Turkio. Kiel vi prepariĝis?*

AR: Unue en julio lastjare, mi aĉetis en Germanio specialan kaj solidan biciklon, kun stirilo sub la sidvangoj; pedalsistemo antaŭe, dinamo, inerta aksingo de frontrado, kotŝirmiloj, pakportiloj, aŭtomataj pedaloj, starigilo, sonorileto, retrospiegulo kaj malkrevelblaj pneŭoj. De tiam mi trejniĝas po cent kilometroj trifoje semajne. Mi faris la necesajn reguligojn. Mi devas aĉeti aŭ fabriki kvar ledsakojn por transporti miajn



pakaĵojn.

E-P: *Tio rilatas al biciklado mem. Mi konstatas, ke vi elektis malpli pezan biciklon kaj rezignis pri ĉareto. Ĉu estas multaj formalajtoj farendaj antaŭ la foriro?*

AR: Mi ankaŭ legis librojn pri Turkio kaj desegnis mian vojplanon. Mi vizitis malsanulejon por ricevi la necesajn vakcinojn. Mi vizitos dentkuraciston. Mi petis novan pasporton ĉar la mia ne plu validos post majo. Finfine, mi kreas TTTejon. Tiel miaj familianoj kaj amikoj povos sekvi mian vojaĝon kaj miajn aventurojn... Ili havos la impreson kunvojaĝi kun mi.

EP: *Se niaj legantoj deziras pli da detaloj pri viaj aventuroj, kie eblos trovi ilin?*

AR: sur la reto, mia TTTejo estas <http://www.la-turquie.com/blogs/list.php?8,usr=3961>.

EP: *Ni dankas vin kaj bondeziras al vi agrablan sesmonatan vojaĝon!*

-0-0-0-0-0-

Ni festis...

* Reĝa kuko: en Marseille kaj La Ciotat (13), la lernantoj de la kursoj festis la reĝojn; kaj laŭ la loka kutimo, kiu iĝis reĝo, portas novan kukon la postan semajnon, tiel dum januaro, ĉiusemajne ni manĝis kukojn kaj trinkis!

* En Saint-Raphaël (83) reĝa kuko anticipis la membrokunvenon. Raportas Monique Prezioso: *Dimanĉon la 23an de januaro ĉe ni estis Reĝkuko de nia Klubo, Kelkaj foraj geamikoj alvenis pli frue por tagmanĝi en Ea etoso.*

Plej parte venis nur je la 14a, ni partigis platkukojn kaj brioĉkronojn kaj kronigis Reĝinojn kaj Reĝojn trinkante cidron kaj aliajn spumantajn vinojn. En tute ni estis 25.

Je la 15a ni komencis ĝeneralan asembleon kiu bone disvolviĝis.



Ni kunfestis

Tago de la Patrino Lingvo: laŭ iniciato de UNESKO, la 21a de februaro estas dediĉita al la patrinaj lingvoj, la lingvo en kiu ĉiu homo strukturigas sian penson kaj malkovras la mondon. En La Ciotat, kun la asocio «Le Grand Portique», kunvenis du-deko da homoj por diversmaniere aŭdigi diversajn lingvojn. Tiel Loukie kun amikino legis alterne en la nederlanda kaj germana konatan fablon «La vulpo kaj la korvo», iu kantis en la provenca, aliaj parolis. Se tiu tago estas bona okazo atentigi pri la malforteco de multaj lingvoj, la organizantoj bedaŭras, ke neniu parolanto de afrikaj aŭ arabaj lingvoj kuraĝas kontribui. Artikolo kun foto aperis en «La Provence» kaj «La Marseillaise».

Tago de la Virinoj: la 8a de marto estas dediĉita al virinoj. En La Ciotat (13) tri esperantistinoj (Loukie, Miette kaj Renée) kunpromenis ĉe la bazaro kun verda pluvombrelo kaj aŭdis virajn rimarkojn jenajn: «Vous n'avez rien d'autre à faire ?».- «Journée de la Femme, journée de la flemme... vous n'avez pas de repassage qui vous attend?». Bela pruvo, ke daŭre indas atentigi pri la neegala situacio de virino. Ĉe la budo pri esperanto deĵoris ne nur virinoj sed ankaŭ Michel kaj Christian. Dum ĝenerala prezentado, ĉe la mikrofono, Renée diris anekdoton, ĵus ricevitan; do bela okazo atentigi, ke esperanto funkcias kiel normala lingvo kaj cirkulas tra la mondo.

Forbiciklado de Alain Rémy al Turkio: pri Alain Rémy, vi povis legi intervjuon sur paĝo 3 Antaŭ ol lia sesmonata biciklado al Turkio, esperantistoj kunvenis por adiaŭi: pikniko ĉe Mireille, promenado inter Figuerolles kaj Le Mugel en amika etoso.

MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO en AGAY (83): jam tradicia tiu labor-kaj-plezursemajno venigis 80 homojn el diversaj landoj por lerni matene, promeni aŭ studi posttagmeze kaj ĝui agrablajn vesperojn. Instruis Stano Marček el Slovakio, Marek Blahus el Ĉekio kaj Spomenka Stimec el Kroatio. Verŝajne nur en Esperantio oni trovas homojn, kiuj pretas pagi por labori dum siaj ferioj! La organizon majstras Monique Prezioso kaj Christine Grayssaguel, nome de Esperanto-Provence. Artikolo aperis en «Var-Matin» la 4an de marto, kaj tuta paĝo aperis en la aprila numero de revuo «Esperanto» dank'al raporto de Daniel Moirand.

Ni ankaŭ laboris

Aix en Provence (13) kaj **Manosque (04)** organizis siajn membro-kunvenojn.

Esperanto-Provence havis komitatkunsidon en Agay la 2an de marto. Jen la ĉefaj traktitaj problemoj: daŭrigi la kompiladon de esperantistoj en Provence surbaze de diversaj listoj; prepari la venontan staĝon kaj membrokunvenon en Saint-Raphaël (83) la 21an kaj 22an de majo (vidu apartan folion en tiu numero de «Esperanto-Provence»), proponi kaj budĝetigi diversajn aranĝojn kadre de Marseille 2013, eŭropa urbo de kulturo, tra Esperanto-la Ciotat; plibonigi nian informadon, internan kaj eksteran per TTTejo.

Marseille, Eŭropa urbo de Kulturo en 2013.

Ĉar en La Ciotat, urbo el Marseille-Provence-Métropole, la asocioj estis invititaj fari proponojn, nome de Esperanto ni faris plurajn. Ili estis diskutitaj dum la Komitatkunsido en Agay la 2an de marto. Pierre Oliva kaj René Triolle plenigis dosieron kaj proponis la jenon:

- ◆ farebla ĉiuokaze: koncerto de Duoble Unu dum aŭtuno 2012.
- ◆ koncerto de JoMo en februaro 2013
- ◆ prelegvojaĝo en la regiono de esperantisto el samjara alia kultura urbo, Kosice en Ĉekio
- ◆ enretigo en Vikipedion de dokumentoj pri Marseille (jam la grupo de Marseille komencis diversajn tradukojn)
- ◆ farebla se estas materia aŭ financa helpo: vojaĝanta ekspozicio pri la lingvoj de la Mediteraneo
- ◆ farebla kun kontribuo kaj financa helpo de aliaj asocioj, komercĉambroj, entreprenoj: dutaga internacia kolokvo pri «lingvoj kaj socioj ĉe Mediteraneo»
- ◆ farebla kun aprobo de Marseille 2013: TTTejo en esperanto (ni provizu la tradukojn, ili la surretigon).

La decidoj estos faritaj dum aŭtuno 2011, tiam ni scios ĉu niaj, aŭ iuj el niaj proponoj estis aprobitaj kaj ricevos la stampon «Marseille 2013».

Sed ek al la laboro! Ĉiu povas ekde nun labori pri tradukado aŭ sin proponi por zorgi pri unu aŭ alia proponoj.

Somerumi en Esperantujo

Jam en aprilo eblas kongresi kun la Britoj, la Israelanoj, Brazilanoj, en Ukrainio, Pollando. En majo, elektu Svedion, Katalunion, Kroation, Bulgariion, Kanadon. En junio, ĉeestu inaŭguron de nova ekspozicio en la esperanto-muzeo de Svitavy, Ĉekio, plulernu en Tampere (Finnlando) pri praktikado, en bulgara monaĥejo pri kuracaj plantoj, aŭ ripozu en Erevano (Armenio).

23-30 julio: Universala Kongreso de Esperanto, la plej granda kaj plej varia internacia aranĝo, en Kopenhago (Danlando). Informoj ĉe www.uea.org/longresoj/uk_2011.html. aŭ tra Esperanto-France, kiu organizas karavanon tien.

info@esperanto-france.org

30 julio-06 aŭgusto: SAT-kongreso en Sarajevo (Bosnio kaj Hercegovino). www.satesperanto.org/2-a-kongreso-bulteno.html/.

14-21 julio: 67a Internacia Junulara Kongreso en Kievo (Ukrainio) www.ijk-67.retejo.info/

Ne forgesu la idealan ripozejon por samtempe praktiki, lerni, distri sin kaj kleriĝi: Kastelo Grésillon apud Luaraj kasteloj.

<http://gresillon.org>

aŭ la vilaĝon Bouresse apud Poitiers kun Kvinpetalo <http://kvinpetalo.org>

Mapo de Esperanto-aranĝoj troviĝas ĉe www.Esperantoland.org kaj la listo de la aktuale konataj aranĝoj konsulteblas ĉe www.eventoj.hu. Montru ilin al viaj konatoj, kiuj dubas, ĉu la lingvo funkcias kaj uziĝas.

La catastrophe du Japon au jour le jour: voir le blog: www.esperanto.provence.free.fr où paraît le journal de bord d'un espérantiste japonais, avec traduction en français.

Apprendre l'espéranto par radio: c'est la nouvelle formule proposée sur <http://aldone.de/retradio>

Ils publient:

Les Provençaux publient dans la presse internatio-

nale espéranto:

* dans "Monato", article de Jeanine Ratouchniak (Belcodène) sur le transport gratuit dans la région d'Aubagne, Marie-Ho (Ceyreste) sur les AMAP, Astrid Millet (Marseille) sur les grèves des magistrats.

* dans "Literatura Foiro", revue littéraire, contribution de notre poète Fra Gaeta de Peypin(13) Merci à tous de faire connaître au monde des problèmes locaux ou nationaux.

Fédération Esperanto Provence
Compte de résultat des activités de la
Période 2010 (année civile)

	Débit		Crédit	
6 070 Achat de marchandise	130,00	7 070	Vente de marchandise	154,00
6 230 publicité, publications	126,00	7 500	Adhésions 71 adhésions directes	390,00
6 240 Déplacement	111,50	7 501	Reversement d'Eo F	146,70
6 260 Frais postaux	354,81	7 610	Intérêts bancaires perçus	70,00
6 720 Frais de stages et d'examen	1125,85	7 700	Inscriptions aux stages	1615,00
6 520 Frais d'AG	35,00	7 760	Dons manuels Daniele Chevalier	5,00
<hr/>		<hr/>		
Total des débits	1883,16	Total des crédits	2380,70	
Résultat positif	497,54	<hr/>		
Balance	2380,70	2380,70		

Disponibilités au 31 décembre 2010 : 5082,00
Toutes les valeurs sont en euro

Programo de Maritza Guturiez

Post partopreno en IREM en Sète, Maritza Guturiez Gonzalez, ĵurnalistino ĉe Radio-Havano vizitos nin. Jen ŝia programo:

Marde la 26an: matene - reveno el Sète tagmanĝo kun asocio pri Kubo en La Ciotat posttagmeze - rapida vizito de Marseille 18-20 - prelego ĉe CIRA, 3 rue Saint-Dominique, apud bd d'Athènes (metroo: Saint-Charles aŭ Noailles)

Merkrede: en La Ciotat 12a - amika pikniko ĉe Renée Triolle, Bello Bauco, 694 chemin de la Civade Verde, 13600 La Ciotat vizito de la urbo 17:45-19:45 - prelego en Le Grand Portique, 18 rue Vignol (malnova urbo; aŭtobusoj el Marseille)

Ĵaŭde: je la 5:50 forveturo al Clermon-Ferrand.

Pliaj informoj ĉe 04 42 71 42 74